

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 46-a BRAZILIO, OKTUBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 2022 N-ro 188

“Amu vian Dion per via tuta koro  
kaj per via tuta animo kaj per via tuta  
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
Jesuo (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte  
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante  
unu la alian, la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.”  
Zamenhof. *La Espero*.



## ELDONEJO LORENZ RETROSPEKTIVO 2022



### EVO PLENUMITA!

Malgraŭ la sennombraj malfacilaĵoj, precipe pro la pandemio, kiam ni vidis plurajn brazilajn eldonejojn fermi siajn pordojn, nia Asocio ankoraŭ staras, kaj ni povas diri ke ĉi jaro estis treege fekunda: ni, kune kun la Brazila Spiritisma Federacio, reeldonis la **Novo Dicionário Português-Esperanto** (Nova Vortaro Portugala-Esperanta), de Allan Kardec Affonso Costa; la jarlibron **Almanako Lorenz 2022**, la bultenon **Komunikoj** kaj ankaŭ reeldonis, en la portugala lingvo, la belan verkon de Lopes Luna, **Zamenhof, o iniciador do Esperanto** (Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto).

Nia Eldonejo, kiel kutime, partoprenis la Brazilan Kongreson de Esperanto, en kies programo nia konsilanto Elmir dos Santos Lima prelegis pri la temo: "150 jaroj de

la naskiĝo de F. V. Lorenz", kaj ni krome ankaŭ organizis budon pri niaj libroj.

Do, karaj, la 15-an de decembro, ni atingis 47 jarojn kun la certeco ke nia devo estis tre bone plenumita; tamen, ni ankaŭ havas certecon ke ankoraŭ estas giganta laboro por fari. Sed sen la apogo de la amikoj kaj membroj de nia Eldonejo, ni ne atingos niajn celojn. Ni volas ankaŭ speciale dank' al la estimataj artikolistoj de **Almanako Lorenz** kaj **Komunikoj**, kiuj, regule aŭ sporade, kunlaboras per belaj kaj neeldonitaj kronikoj. Nome de la Estraro kaj Konsilantaro de Lorenz, profundan dankon al ĉiuj! Venu la jaro 2023 kun la benoj de Dio! Fekundan Novjaron!

Frate vin brakumas,

La Estraro



# LA PENSOJ ESTAS FORTOJ

*Abel Gomes*

La pensoj, eĉ sen vortoj  
Tre grandaj estas fortoj,  
Kaj povas bonon krei  
Aŭ al malbon' obei.

Se iu pensas ŝteli,  
Mortigi aŭ ribeli,  
Spirite li jam faras  
Ja kion li preparas.

Se pensas li pri krimo  
Li iĝas tuj viktimo  
De krima la ideo,  
Gvidante al pereo.

Nu, pensu ĉiam bonon,  
– mi donas ĉi admonon, –  
Pensadu pri la sano  
Kaj pac', kaj ne pri vano!

Ne pensu pri milito  
Nek pri mirakla mito,  
Nek pri malsan', danĝero:  
Protektos vin l' espero.

Reformador, Feb. 1946, p. 30  
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

## LA VIVO

*Antonio Felix da Silva*

Haltu kaj rigardu la Naturon!  
Nun, la suno ekbrilas.  
Mia Animo ĝojas,  
Ĉar la vento blovas sur la kampoj.  
La parfumoj el la floroj ebrigas min.  
Mi ridetas al vi en tiu etoso de amo,  
Ĉar la vivo estas palpebla:  
En la rigardo de la infanoj.  
En la flugo de la birdetoj.  
En la esenco de mia Animo.



**KOMUNIKOJ** N-ro 188



### ALMANAKO LORENZ 2023

Artikolistoj de Almanako Lorenz 2023,  
ne forgesu ke la limdato por liveri viajn  
tekstojn estas 31/12/2022.

“Vivu, kresku kaj floru la verda standardo”.

| **KOMUNIKOJ** | Jaro 46-a  
| n-ro 188 | Oktobro-Novembro-Decembro | 2022  
SPIRITISMA ELDONA ASOCIO  
FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ  
Fondita la 15-an de Decembro 1975  
Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz  
23520-210 - Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)  
☎ +55-21-98427-8080  
Librovendejo: editoralorenz.com.br  
Retadreso: editora\_lorenz@uol.com.br  
Fejsbuko: Editora Lorenz

| Kompostita de Rogério Mota |



## Kuriozaĵoj el la Leteroj de Zamenhof

Al s-ro K. en Bogučar. (ov. 11-33)

Mi jam respondis al Vi per letero; sed ĉar tiun saman demandon mi ricevis ankaŭ de kelkaj aliaj personoj, mi donos pli detalan respondon tie ĉi. Ŝanĝi la nomon de nia lingvo nun estus tre malutile, ĉar la publiko pensos, ke ĝi estas ia nova lingvo kaj tiel, anstataŭ fortigi nian aferon, ni ĝin nur malfortigus. La plej granda parto de la publiko estas tute indiferenta por ĉia nova afero, la plej gravan aferon ĝi lasas sen atento, se tiu ĉi afero ne fariĝis ankoraŭ sufiĉe moda, kaj la plej sensencan bagatelon la tuta amaso de l' mondo baldaŭ akceptas, se ĝi nur estas en modo.

Tiun ĉi karakteran econ de la publiko ni devas ĉiam bone memori, se ni volas, ke nia afero sukcesu. Se la publika amaso konstante aŭdadas la nomon de nia afero, ĝi ekmemoros ĝin, ĝi kutimos ĝin respekti kiel aferon fortan kaj ĉiam pli fortiĝantan, kaj pli aŭ malpli frue la plej indiferentaj aliĝos al ni; sed rekte kontraŭan rezultaton ni atingos, se ni ofte ŝanĝados la nomon de nia afero, kun ĉiu nova ŝanĝo ni devos denove komenci la batalon kontraŭ la indiferenteco, kaj en la okuloj de la publiko, kiu longan tempon konas nur la nomojn antaŭ ol ĝi decidus ekkoni la aferojn, ni restos ĉiam malfortaj. Kian nomon nia afero havos, estas tute egale, ĉar la nomo estas nur sensignifa sono, kondiĉa signo sen graveco interna; sed la nomo estas nia standardo, per kiu ni povas diferencigi amikojn de malamikoj, kaj kiu montras al la publiko la unuecon de niaj diversaj batalantoj en diversaj lokoj; kia ajn la standardo estas, ĝi devas resti ĉie kaj ĉiam tiu sama, por savi nian aferon de miksado kaj konfuzo. Se ni volus intence elpensi ian nomon por nia lingvo, ni povus sendube trovi multe pli konvenan kaj pli logikan nomon ol "Esperanto"; sed la nomo de nia "lingvo ne estas elpensita, kaj jen estas ĝia historio: Eldonante la unuan lernolibron de nia lingvo, mi prenis por mi la pseŭdonimon "Esperanto"; la lingvo mem havis nenian propran nomon kaj estis nomata la lingvo internacia proponita de "Esperanto". Pro oportuneco oni komencis uzadi la esprimon "lingvo de Esperanto" (die Esperanto-Sprache): aliaj esprimoj, kiujn kelkaj provis uzadi (ekzemple, "la lingvo Internacia", "la internacia"), montris sin neoportunaj kaj ne enfortikiĝis, ĉar ili estis ne bone elparoleblaj, ne memoreblaj por la publiko kaj prezentis nenion difinitan (ĉar sub "lingvo internacia" oni povas egale bone kompreni la Volapükon aŭ aliajn proponitajn projektojn). Baldaŭ montriĝis, ke nur la vorto "Esperanto" (sole aŭ kun aliaj vortoj) klare diferencigas nian lingvon de aliaj, kaj multaj amikoj komencis baldaŭ en siaj leteroj aŭ artikoloj uzadi simple la solan vorton "Esperanto", ekzemple "la afero Esperanto", "skribi en Esperanto" k. s. Tiel iom post iom ellaboriĝis unuvorta nomo de nia lingvo. Vidante, ke mia komenca pseŭdonimo transiris al la afero mem kaj ke ĝi estas tre oportuna, mi baldaŭ tute ĉesis uzadi mian

pseŭdonimon, kaj ĝi restis nur kiel nomo por la afero mem. La nomo "Esperanto" estas per si mem tute senlogika; sed en signifiĝa kondiĉa nomo kial ni bezonas logikon? La plej grava estas tio, ke sub tiu ĉi nomo nia afero estas jam iom konata en la mondo, dum alia nomo estus por la publiko tute nova, kaj la fruktoj, kiujn ni jam gainis, estus nun perditaj. Estas necese, ke ni ĉiam ripetadu unu nomon al la oreloj de la publiko, por ke ĝi kutimu je la nomo kaj respektu la konstantecon de afero. "Esperanto" estas nun nomo de afero kaj ne de persono; "Esperantisto" nun tute ne signifas "Zamenhofisto", sed kontraŭe, Zamenhof estas unu el la Esperantistoj.

Zamenhof



## KIAM MI MORTOS

Gonçalo Neves

Kiam mi mortos,  
ne memoru min kiel filon, fraton, patron,  
edzon, kompanion, amikon.

Memoru min nur  
kiel poeton,  
kiel homon, kiu ŝatis rigardi la birdojn  
kaj ilin enviis;  
kiel maturan infanon reveman;  
kiel homon, kiu pensis strangaĵojn,  
ne pro la plezuro diferencii de l' ŝablono,  
sed pro interna bezono nebridebla;  
kiel homon, kiu ne povus esti alia,  
ĉar li kreis por si mision  
plenumendan poiome.

Memoru min kiel homon,  
kiu mense dialogis kun la arboj,  
admirante iliajn brakojn kaj fingrojn,  
kiu petis de ili klarigon neeban  
pri sia morba soleco.

Kiam mi mortos,  
ĝoju la veraj amikoj tial, ke ili min konis,  
kaj la malamikoj, pro evidentaj motivoj,  
kaj ploru iuj pro konvencio,  
kaj reagu indiferece ĉiuj ceteraj,  
ĉar tiel estas vole nevole,  
kaj tiel estu por ĝenerala kontentigo.

Kiam mi mortos,  
kiel diris alia poeto  
(ege pli merita),  
restu la balkon' aperta,  
por ke mi ricevu pli da lumo  
kaj freŝan aeron por la granda vojaĝo.

Nur tiel kaj tiam mi fine liberiĝos  
de mi mem provizore  
ĝis venonta provo...





## LORENZ KAJ LA BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

DE LA 12-A ĜIS LA 15-A DE NOVEMBRO, pli ol 100 geesperantistoj partoprenis la 56-an Brazilan Kongreson de Esperanto en bela urbo Ribeirão Preto, San-Paŭlo. La programo estis tre riĉa: diversaj prelegoj, Arta Vespero kaj eksteraj aktivaĵoj.

40 samideanoj ĉeestis la prelegon de nia Asocio. Elmir Santos Lima, nia konsilanto, disvolvis la temon "150 jaroj de la naskiĝdato de F. V. Lorenz", patrono de nia Eldonejo. Post la prelego, ni disdonis librojn per lotado. Nia Eldonejo ankaŭ organizis budon kaj lanĉis la novan portugalan eldonon de la bela verko de la karmemora argentina samideano Lopes Luna: "Zamenhof, o iniciador do Esperanto" ("Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto"). Gratulon al ĉiuj! Ĝis 2023!



## KION PENSAS SPIRITISTOJ PRI MANKO DE LABORPOSTENOJ?

Paulo S. Vianna

Brazilo trapasas socian krizon — pri tio ŝajne plej multaj legantoj konsentas. Milionoj da mizeruloj ne havas la minimuman kvanton da nutraĵoj, kio transdonas al ĉiu konsciencohava braziliano teruran senton de angoro. Kion pensi pri tio?

Sendepende de nia firma kredo, ke la volo de Dio nepre plenumiĝas, ĉie kaj ĉiam, ni tamen havas la civitanan devon kompreni la suferon de tiuj malfeliĉaj gefratoj, kaj se eble iel helpi. La registaro mem komprenas tion kaj klopodas liveri iom da mono al ili, sed oni povas facile taksi, ke tiu helpo tute ne sufiĉas por digna vivo.

La ĉefa demando estas: kial mankas laboro en nature riĉa lando kia estas Brazilo?

La Spiritisma Doktrino instruas, ke laboro estas dia leĝo. Ĝi estas necesa por la korpaj bezonoj, por spirita evoluo, por elvolviĝo de la inteligenteco kaj de la moralo. En la naturo ĉio laboras, kaj por la homo ĝi estas *“rimedo por plialtigo de la penso”*. Jen plia emfazo al la dramo de senlaboreco!

Eĉ en pli superaj mondoj ĉiuj laboras, kvankam malpli materie: *“senokupeco estus turmentego”*, informas la Spiritoj. Riĉuloj sur la Tero eble ne havas materiajn bezonojn, sed ankaŭ ili havas la devon *“esti utilaj”*. Kaj se iu homo troviĝas en situacio, ke li tute ne povas labori, pri tio la Spiritoj diris: *“La forta devas labori por la malforta; se mankas familio, la socio devas subteni la maljunulon; tion ordonas la leĝo de karitato.”*

Kaj Kardec komentis, fine de la ĉapitro pri Leĝo de Laboro, en La Libro de la Spiritoj:

*“Ne sufiĉas diri al la homo, ke li devas labori; estas ankaŭ necese, ke tiu, kiu esperas sian vivtenadon el laboro, trovu ian okupon, kaj tio ne ĉiam okazas. Kiam la interrompo de laboro ĝeneraliĝas, tiu fakto ricevas amplekson de malfeliĉego, kia estas malsato. La ekonomio serĉas por tio rebonigan rimedon, klopodante por la ekvilibro inter produktado kaj konsumado; sed tiu ekvilibro, eĉ se oni supozas, ke ĝi estas ebla, estas nepre intermita, kaj ankaŭ dum tiuj intertempoj la laboristo bezonas vivi. Estas faktoro, kiu ankoraŭ ne estas metita sur la teleron de l’ pesilo kaj sen kiu la ekonomia scienco nenio estas krom teorio: ĝi estas edukado, ne la intelekta, sed la morala edukado; ne, ankaŭ, la morala edukado per libroj, sed tiu, konsistanta en la arto formi karakterojn, tiu, haviganta kutimojn: ĉar edukiteco estas la tutaĵo de akiritaj kutimoj. Se ni pensas pri la multego da individuoj, ĉiutage puŝataj en la torenton de loĝantaro, sen iaj principoj, sen ia brido, donitaj al siaj propraj instinktoj, ĉu ni miru la ruinigajn sekvojn de tiaj cirkonstancoj? Kiam tiu arto estos konata, komprenata kaj praktikata, tiam la homo enkondukos en la socion kutimojn je ordo kaj antaŭzorgo por si mem kaj por siaj samrondanoj, je respekto por la ŝatindaj aferoj; kutimojn, kiuj ebligas al li travivi malpli pene la sufertagojn, kiujn li ne povos eviti. Senordeco kaj neantaŭzorgo estas du kanceroj, kiujn nur bone komprenata edukado povas elsarki; en tia edukado troviĝas la deirpunkto, la reala faktoro de bonfarto, la garantio de ĉies sekureco.”*

Saĝaj kaj aktualaj vortoj!

# LA PARDONO

**H**O, ANIMO, KIU, VUNDITA de la akutaj sagoj de la homa orgojlo, serĉas rifuĝon en la Dia koro – pardonu! Pardonu tiujn malfeliĉajn homojn, kiuj, senkonscie, kontribuas por via estonta malfeliĉo, ĉar tiuj, kiuj suferos la homajn maldankojn, vidos siajn larmojn forviŝitaj de la Dia Konsolanto!



Suferanta animo! Ĉu vi vidas tiujn delikatajn floretojn, kiuj parfumas la surterajn ĝardenojn? Ĉu vi jam rimarkis kiel ili ricevas en siajn kalikojn la refreŝigan matenan roson? Kaj ankaŭ, kiel tiuj floretoj inundas siajn petalojn per tiu roso, tiamaniere penante sin defendi kontraŭ la varmegaj sunradioj ilin kalcinantaj?

Ho, suferanta animo, estu kiel tiuj floretoj! Akceptu en vian sinon la refreŝigantan roson de la Pardonu!

Entenu viajn pensojn en la senmakula pureco de tiu dia roso, kaj tiam vi ne sentos la varmegajn radiojn de la homa egoismo celantaj vin kalcini!



Ploranta animo! Ĉu vi vidas tiujn birdetojn, kiuj, kantetante, flugas sub la blua kaj sennuba ĉielo? Ĉu vi jam vidis kiel ili, sentante la purecon de la ĉielo kaj la bluan de la firmamento, forgesas, ke sur la tero la venenaj reptilioj ilinserĉas por satigi siajn voremajn malsaton? Ĉu vi jam rimarkis kiom ili estas malpezaj kaj kiom la pezoforto preskaŭ ne ekzistas por ili? Ĉu vi jam rimarkis, ke ili konstruas siajn nestojn nur sur la arbosuproj, inter la verdaj folietoj, ilin kaŝante for de la videmaj okuloj?

Ploranta animo! Estu kiel tiaj birdetoj!

Flugu ĝoje kaj feliĉe tra la blua kaj purega ĉielo de via konscienco, kaj, sentante ĝian purecon, vi forgesos ke la Tero estas loĝata de senkompataj kaj malbonaj homoj.

Sentante la ĝojon estigitan de ia trankvila kaj lumigita konscienco, vi senfine kompatos tiujn povrajn animojn, vagantajn tra la mondo, blindpalpantajn la tenebrojn ilin ĉirkaŭantaj; tiujn malfeliĉajn animojn, sinjetantajn en abismon de eraroj kaj pasioj, pensante, ke en ĝi ili trovos la trankilecon kaj la pacon por siaj konsciencoj tute asfiksiitaj de la fumo de orgojlo kaj vanto.

Kompatu, do, tiajn malfeliĉulojn... kaj ilin pardonu!

Serĉu en Dio la forton por via koro, kaj tiam vi elportos la mondo-tentojn, kiuj estas potencaj fortoj, klopodante altiri la progresantajn animojn, por ilin ĵeti en la malpuran kaskadon de la materialismo.

Pardonu, do, ĉar la Pardonu estas la mirakla filtrilo, kiu purigos kaj diigos tiun malpuran akvon, farante ĝin kristala kaj diafana kiel lumradioj.

Konstruu por vi mem sekuran ŝirmejon, kie vi povos kaŝi viajn bonfarojn, apartigante ilin for de la scivolaj rigardoj, kaj pardonu tiujn estulojn, kiuj hipokrite disdonas nur siajn **restantajn** troaĵojn.

Ilin pardonu kaj ilin bonvoleme instruu kiel fariĝi vere bonfaremaj.

Kaj se vi penos vidi tiujn maldankemojn kaj malbonaĵojn tra la prismo de l' pardonu, vi sentos, ke ili estas nur kruelaj sekvoj de malklereco kaj de malkompreno!

Malklereco pri tio, kio estas Amo.

Nekompreneco de la Diaj Veroj!

Kaj vi, ploranta animo, konkretiĝante en la Amo – la plej dia vorto en la tuta Universo – nepre kondukos tiujn malklerajn kaj malkomprenemajn homojn al la sino de Dio!

Pardonu, ĉar nur en pardonu vi trovos la rekompencan de ĉiuj viaj doloroj kaj de ĉiuj viaj sinoferoj.

Marto, 1939

Spirito: Icléia

Mediumo: Brunilde Mendes do Espírito Santo

Libro: *Sementes Fecundas*

El la portugala tradukis: Benedicto Silva



# LA ARBO DE SCIADO

**L**A ARBO DE SCIADO donas siajn fruktojn, kaj ili, pendantaj, sin proponas al la vivopasantoj, kiuj alproksimiĝas kaj ilin rifuzas, serĉante la ombron de konveneco por disĵetiĝi surgrunden kaj disvastiĝi, sorbante nur la freŝecon de amika ombro.

La fruktojn ili disdegnis kaj terenĵetis. Maturaj fruktoj, pretaj por konsumo estis forĵetataj kaj vundataj.

La fruktoj de sciado ne perdiĝas. Kiom ajn oni faligas pomojn de arbo, aliaj naskiĝas kaj disponiĝas al ĉiu pasanto. Pomoj pretaj por esti manĝataj.

Al la stultularo ne plaĉas tia frandaĵo. Ĝi ne celas satigi, ĉar ĝi ne konscias la propran malsaton.

Aliaj, ankoraŭ en malfrua irado, komencas malsati pri sciado, ĉar, malfermante la okulojn, ili ekvidas novajn horizontojn, anksie avidas ĉiam pli kaj pli grandan sciadon.

La deziro kompreni estas malsato nekontentigebla per malmulto. Pokaj pomoj nin pli multe malsatigas.

Dia malsato!

Ni satigu al ni la volon scii, ni satigu al ni la tutan scivolon. Ni penadu venki malscion per edifa studado, per utila esplorado, per profunda pripensado.

Rekonstrui... Sin mem rekonstrui.

Refari konstituas ĉefan laboron por ni ĉiuj.

Sin mem konstrui estas la dia argumento por leviĝo al diaj altaĵoj.

Ni nutru nin per sciado kaj ĝin uzu por la konstruo de nia propra konscienca domo.

Renovigu viajn bazojn kaj vin mem. Rebonigu al vi la fortojn per tio, kion vi ricevis dank'al la dia mizerikordo.

Ĉar efektive Jesuo kaj lia doktrino estas la arbo de senfinaj pomoj, neelĉerpebla arbo kapabla satigi la tutan homaron. Ĝi ankoraŭ estas atakata, ĝiaj branĉoj, deŝirataj, ĝiaj folioj, ĉifataj, ĝiaj floroj, pistataj, ĝiaj fruktoj, disŝutataj.

Nuntempe malmultaj el ĝiaj fruktoj renkontas la buŝon de la homaraj vojirantoj.

Baldaŭ ĉiu frukto estos konsumita de la sin elaĉetinta homaro. La homoj, reboniĝintaj, uzos ĉiun punkton de la historio de la Kristo kaj ilin tute profitos.

Danka al Dio pro la proponita kampo, pro la irejo al ni ĉiuj disponigita. Danka al Dio en ĉiuj momentoj.

Spirito: Antônio Francisco.

Kunlaboris: João Marrara

Tradukis el la portugala: Affonso Soares



Jam estas tempo por realiĝi aŭ aliĝi al nia Asocio por la nova jaro. Per la aliĝo la ano ricevos nian jarlibron, Almanakon Lorenz, la trimonatan bultenon Komunikoj

kaj ankaŭ rajtas elekti du librojn el nia katalogo, kaj rabaton de 30% ĉe la aĉeto de niaj libroj. Petu tuj vian aliĝilon:

editora\_lorenz@uol.com.br

(021) 98427-8080

**KOMUNIKOJ** N-ro 188

# DIO, KRISTO KAJ KARITATO

**L**A STANDARDO BLANKA, neĝblanka kun orkoloraj franĝoj.

Sur centra, heraldika loko, ĉielblua skribo. La Kreinto, la Majstro kaj la redempta agado.

Jen la brazila paliumo etendiĝanta sur la tuta mondo.

La devizo de laboro kaj estonteco.

Ni ĝin honoru kaj prepariĝu.

Spirito: Antônio Francisco

Tradukis el la portugala: Affonso Soares

Kunlaboris: João Marrara

**L**ERNU PER LA LEKIONOJ DE LA VIVO, sed ĉefe per viaj propraj spertoj, ne konfidante al la "kantoj de sirenoj", kiuj ensorĉas kaj trenas al la abismoj.

Se la ebrulo deziras sin liberigi de la alkoholo, li trovos pli facile tiun, kiu donacos al li 5 glason da drinkaĵo, anstataŭ doni al li panon.

Se la fumanto volas forlasi la tabakon, la ironio de la amikoj klopodas ridindigi lin, insistante ke li plue sin venenu.

Se la droguzanto klopodas forlasi la drogon, la drogvendisto minacas kaj ĉantaĝas lin.

Se deliktulo de ia ajn grado deziras sin rekuperi, svarmas ĉirkaŭ li tiuj, kiuj konspiras kontraŭ lia klopodo.

Zorgu do, kaj vintenu sana, fizike kaj morale.

Libro: Vivo feliĉa

Spirito: Joanna de Ângelis

Mediuna: Divaldo Pereira Franco



## SENPAGAJ LIBROJ!

**K**araj eksterbrazilaj gelegantoj de *Komunikoj* en la tuta mondo! Se vi volos ricevi niajn librojn kaj la jarlibron, *Almanako Lorenz*, tute senpage, per la pdf-a aŭ papera versioj, sendu al ni mesaĝon kun via kompleta nomo kaj poŝtadreso. Kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi:

[editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)





# MEDIUMA TEKSTO DE ANDREO LUDOVIKO

**E**KSTIĜAS LA VOJOJ por ia nova homaro. Konturiĝas la perspektivo de luksega estontecco por la spiritoj, kiuj, trapasante la surteran vivon, sciis trinki el la pokalo de la amaraĵoj la instruojn de la Majstro. Kaj – kiel ajn malbona ĝi ŝajnas al la pesimistoj, al la aŭgurantoj de la tragikaj horoj – la Majstro promesis, ke iam Li revenos por konduki nin ĉiujn al la trono de la Patro.

Pro tio, la profetaĵoj pri la angoro kaj despero tute ne superregos la promesojn de la Sinjoro, ĉar, kiel la Sendito de la Patro, ekde la komenco Li sciis, ke la destino de la homaro nepre estos la atingo de la spirita perfekteco kaj la konkero de la Dia Regno.

Tamen, malgraŭ la doloroj, la suferoj kaj la katastrofoj, kiuj sentiĝas kiel necesaj por la purigado kaj perispirita imuniĝo, jam duonvidiĝas la eklumoj de nova aŭroro, kiu nepre ekaperos, kiel eklumado en la Erao de la Spirito.

Tiel same, kiel en la anticipo de la frumatenoj, dum la ĉesiĝo de la trembrilo de la frumatenaj steloj oni antaŭsentas la malprecizajn lumojn de nova tago, jen komencas aperi, en la limoj dela spiritaĵoj, en la kosma ellaborado de la novaj tempoj, la primicoj de la Tria Jarmilo.

La tenebroj hodiaŭ envolvantaj la planedon, kaj kiuj en ĉiu tago sin prezentas pli densaj, baldaŭ cedos kaj tute fordisiĝos, ĉar, finfine, la lumo de la Sinjoro venos por brilegi super ĉiuj personoj, estigante ĉiujn lumojn por la Festo de la Edziĝo, kiam la homaro survestos, per la spirita puriĝado, la nuptajn tunikojn.

Nu, miaj gefratoj, preparu vin por la naskiĝo de la Nova Erao!

Per la rebonigo de viaj agmanieroj, kutimoj kaj sentoj, klopodu nudigi vin je la malnovaj vestaĵoj, por anstataŭigi ilin per la blankaj kostumoj de la senmakulaj spiritoj.

Forgesu la malamojn, la militojn, la egoismon, la vantecon kaj la orgojlon, kaj ŝanĝu viajn korojn – hodiaŭ kaŝejoj de primitivaj sentoj kaj emocioj – en tenejon de Universala Amo, iam fratece unuiganta ĉiujn homojn, kreante ene de ĉiu el ili la Ĉielan Regnon, kie la Sinjoro regos por ĉiam.

Andreo Ludoviko

**ANDREO LUDOVIKO** – Kuracisto, Spirito kiu diktis serion da dek ses libroj, pere de la mediumeco de Francisco Cândido Xavier, sub la gvidado de la Spirito Emmanuel.

El la portugala tradukis: Benedicto Silva

## OMAĜO DE LORENZ AL NEIDE

La 10-an de Decembro 2022 elkarniĝis en la urbo Niterói, Rio-de-Janeiro, Neide Barros Rêgo, membro de la Beletra Akademio de Niterói kaj aktiva esperantistino. Dum sia vivo, ŝi multe faris por Esperanto, precipe en la kampo de la artoj, pli specife koncerne poezion kaj kanton. Ŝi, sendube, estis la plej kompetenta esperantistino kiu deklamis poemojn en la internacia lingvo en Brazilo! Mirinda samideanino! Aŭdi Neide estis kiel aŭdi la plej belan kanton de la birdoj! Nome de Eldonejo Lorenz, ni esprimas sincerajn kondolencojn al la familio de nia kara fratino. Ĝis baldaŭ, Neide! Elkoran dankon!

La Estraro  
Eldonejo Lorenz



# 1-a SPIRITA PILGRIMADO POR LORENZ

**L**A 17-AN DE DECEMBRO, sabate, la urba registaro de Dom Feliciano okazigis tuttagan eventon omaĝe al Francisko Valdomiro Lorenz, okaze de lia 150-a naskiĝdatreveno.



La karavano de GEA kune kun Fernando kaj Leda Lorenz ĉe la monumento-tombo

Matene la kelkdek partoprenantoj renkontiĝis ĉe la monumento-tombo de Lorenz (kie estas sepultita ankaŭ lia unua edzino, Ida). Tie, ĉe la tombo, post solena parolado de Aline Rosiak, direktorino pri merkato kaj komunikado de la urba registaro, estis inaŭgurita nova informŝildo. Tuj poste oni komencis piediradon laŭ la



La nova informŝildo ĉe la monumento-tombo

strato Júlio de Castilhos, ĉe kiu troviĝas ankaŭ unu el la domoj, en kiuj Lorenz loĝis, kaj krome, tre proksime, la domo konstruigita de unu el liaj filoj, Otto Lorenz, kiu samtempe servis kiel loĝejo kaj apoteko. Antaŭ tiuj du domoj estis inaŭgurataj pliaj informŝildoj, kiuj restos tie, je la dispo de la preterpasantoj. La domogon, cetere, la urba registaro antaŭ nelonge luis, interalie por tie krei permanentan ekspozicion pri Lorenz kaj gastigi la urban socialan projekton pri muzikinstruado.



La domog

La promeno finiĝis ĉe la alia pinto de la strato Júlio de Castilhos, kie troviĝas la Kulturdomo de la Pola Enmigranto. Tie estis inaŭgurita



Fasado de la Kulturdomo de la Pola Enmigranto





Parto de la ekspozicio "Dom Feliciano - hejmo de Lorenz"

la ekspozicio "Dom Feliciano - hejmo de Lorenz". Tie oni povis vidi montrotablon sur kiu troviĝis multaj verkoj pri kaj de Lorenz, el la kolekto de la urba biblioteko (inkluzive de fotokopioj de neniam eldonitaj manuskriptoj), kaj ankaŭ la plurpanelan, inform- kaj bildoriĉan tekston de Tales Bieszczad, nepo de Lorenz. Estis ankaŭ pluraj bele presitaj fotoj pri Lorenz, kaj eblis surloke aĉeti la plej freŝan libron pri li, "Francisco Valdomiro Lorenz - Um homem além do seu tempo", lanĉitan en 2021 de Luciana Novinski (kiu estis tie kaj aŭtoĝrafis la venditajn ekzemplerojn).

Post la tagmanĝo oni revenis al la Kulturdomo, en kies korto okazis sinsekvo da paroladoj kaj prelegoj. Unue oni spektigis al la publiko la filmeton "Muitas Vidas", kaj tuj poste eltiraĵojn de la pli nova filmeto "O agricultor que falava mais de 100 línguas". Sekvis ankoraŭ du intervjuoj speciale registritaj por la okazo.



La publiko en la korto de la Kulturdomo

Tiam alprenis la parolvicon Clenio Boeira, la urbestro de Dom Feliciano, kiun sekvis Fernando Lorenz, pranepo de la omaĝato kaj honora konsulo de Ĉeĥio en Porto Alegre. Postvenis pluraj spiritistoj, kiuj reprezentis diversajn instituciojn, kaj antaŭlaste mi havis la okazon iom paroli pri la Esperanto-agado de Lorenz. Mi ankaŭ transdonis al la urbestro du librojn donacitajn de Eldonejo Lorenz al la urba biblioteko, kiujn mi estis transpreninta en la

Brazila Kongreso de Esperanto. Fermis la eventon plia interveno de Fernando Lorenz, kiu kortuŝe dankis la ĉeestantojn kaj organizantojn reliefigante la partoprenon de sia ĵus resaniĝinta patrino, Leda Lorenz. Bildo ▲



Miĥaelo Bento transdonas la librojn donacitajn de Eldonejo Lorenz al Clenio Boeira

Temis do pri tre inda kaj varia evento, kiu kortuŝis kaj klerigis la partoprenantojn kaj elmontris la intereson de la urba registaro pri la heredaĵo de Lorenz. Tamen nenio povas esti perfekta, kaj mi persone bedaŭras, ke partoprenis malmultaj loĝantoj de la urbo (estis precipe organizantoj, familianoj de Lorenz, esperantistoj (Gaŭĉa Esperanto-Asocio organizis karavanon el Porto Alegre) kaj spiritistoj), kaj ke multaj el la spiritismaj prelegantoj retenis sin ĉe ĝeneralaj meditadoj kaj maltro parolis pri la vivo kaj la verkaro de Lorenz mem. En la sekva jaro estos okazo realigi eĉ pli bonan eventon - ĉar ja oni anoncis la intencon de nun okazigi la "Spirititan Pilgrimadon por Lorenz".



Monumento-tombo de Lorenz kaj la nova informŝildo



Unu el la domoj, kie Lorenz loĝis

Filmeton kaj fotoalbumon pri la aranĝo oni povas trovi en la paĝo de la urba registaro de Dom Feliciano en Facebook.

Miĥaelo Bento

**ANKORAŬ PRI LA  
PARTOPRENO DE  
LORENZ ĈE LA  
56-a BRAZILA KONGRESO  
DE ESPERANTO**



**Amikoj de Lorenz.  
Koran dankon!  
Ĝis Fortaleza!**

